

Esperanto Societo Frankfurto

# Esperanto-Informilo



Foto: U. Fellmann, la 30-an de aŭgusto 2025, momentfoto de la internacia kunvena festivalo (germane: “Internationales Begegnungsfest”) je la paca placo (Friedensplatz) en Darmstadt.

Mesaĝo de la prezidanto:
lastan sabaton ni renkontiĝis posttagmeze apud la Esperanto-pavilono, kiun lokaj Esperantistoj okazigis dum la *Internacia kunvena festivalo* sur la Friedensplatz en la urbocentro de Darmstadt. Estas ja bone se la lokaj kluboj subtenas unu la alian, kune informas kaj reklamas pri nia agado en la regiono - kaj Darmstadt ja ne estas tiom for de Frankfurto. Estis bonega somera vetero kaj amaso da homoj survoje. Ekestis bonaj interparoloj kun pasantoj kaj vizitanoj de la festivalo kaj la mallongdaŭra pluvetoj tute ne ĝenis, ĉar ni restis kun pasantoj sub la tegmento de la pavilono dum pluvis kaj povis montri broŝurojn kaj disdoni reklamaĵojn.

G. Hennemann, 1-an de septembro 2025



Septembro 2025

Rubrikoj ĉi-numere:


- Programo
- El la klubo
- Eseo
- Diversaĵoj
- Raporto
- Lasta paĝo



Kolofono:
Redaktoro teamo:
Georg Hennemann
Ulrich Fellmann
Korektanto: F.U.



c/o Georg Hennemann
Rehgartenstrasse 16
35683 Dillenburg
Tel.: 02771 8196614


**Bankverbindung / bankkonto:**
Esperanto-Gesellschaft F.a.M
IBAN: BE92 9051 1007 7223
BIC: TRWIBEB1XXX
bei: Wise, Belgien

**Jahresbeitrag / jarkotizo:**
ESF+DEB-Beitrag: 96 €
Familienmitglied: 48 €
Nur ESF: 24 €
Familienmitglied: 12 €

# Programo

**Unua mardo**
La 2-an de septembro 2025
ekde la 19-a horo: Sentema babilado per Zomo

Ligilo: https://zoom.us/j/97497349753?pwd=OTBsMnladnA3UVhuRy9Ta0dYcFNldz09

**Dua mardo**
La 9-an de septembro 2025
ekde la 19-a horo: Interna babilado per Zomo

Ligilo: https://zoom.us/j/97497349753?pwd=OTBsMnladnA3UVhuRy9Ta0dYcFNldz09

**Tria mardo**
Surloke: Saalbau MÜZ Schönhof, Rödelheimer Str. 38, 60487 Frankfurt am Main

Dienstag, den 16. September, 2025 --- Mardo, la 16-an de septembro, 2025

18:30 h
Sprachrunde Lingva Rondo
"U. Fellmann"

19:30 h
Vortrag Prelego
""
U. Fellmann, F. Lappe, G. Hennemann k.a.

**Mardo, la 23-an de septembro, 7pm**
ekde la 19-a horo: „Senprograma samideana babila renkontiĝo"
Stattcafé, Grempstraße 21, 60487 Frankfurt am Main

---

Bildfonto kappaĝo: Panorama vido el la 2021 rekonstruita Goetheturm en Frankfurto je Majno

By Tobias.Nicol – Own work, CC BY-SA 4.0, https://commons.wikimedia.org/w/index.php?curid=103455745,
https://commons.wikimedia.org/wiki/Henninger-Turm#/media/File:Cityscape_Frankfurt_2021_Panorama.jpg

# El la klubo

**Anoncoj:**

- 30.8.25 ekde 12:00 Uhr

  Nian someran feston ni faras ĉifoje en la scienca urbo Darmstadt sur la Friedensplatz (Paca Placo), kune kun niaj ĉi-tieaj samideanoj, samtempe kun volontula reklamo kaj disdono de informo pri nia klubo kaj nia agado.




La elstara foto : Lumreklamilo en Brno., La 26-an de julio de U. Fellmann

# Eseo - "La metusalem komploto", libro de Frank Schirrmacher el la jaro 2004)

Frank Sĉirmaĥer, germana ĵurnalisto, eseisto, aŭtoro kaj kunredaktoro de la Frankfurter Allgemeine Zeitung (FAZ) dum 20 jaroj (ekde la komenco de 1994 ĝis sia morto) skribis en sia libro *La metusalem komploto*: „Ĉiu dua knabineto, kiun ni vidas surstrate hodiaŭ, havas vivdaŭron de 100 jaroj, ĉiu dua knabo verŝajne vivos ĝis 95... Jen la biologia triumfo de nia generacio. Ni ne konkeris landojn, ni konkeris vivdaŭron." Tiu estas centrala citaĵo el la libro „La metusalem komploto" de F. Schirrmacher. Sed kion tiu signifas por la hodiaŭa socio? Ĉu tiu longviveco estas ŝanco por la socio aŭ nura ŝarĝo, ĉar pensiuloj ne plu laboras kaj nur kostas? En okzidentaj landoj – alie ol en orientaj kaj plejparte muslimaj landoj, la averaĝa aĝo de la popoloj daŭre kreskis kaj en la jaro 2050 la procentaĵo de olduloj aĝaj pli ol 60 estos pli ol 40% de la tuta popolo. Tiuj nombroj ne plu estos kontrolebla, se la situacio ne signife ŝanĝigas: La granda sperto kaj saĝeco de la aĝuloj hodiaŭ ne estas aprezitaj sed konsekvente neglektitaj. Tiu estas skandalo kaj kaŭzas senprecedencajn sociajn deviojn. Unuflanka la maljunuloj estas forpuŝita el la laborprocezo, aliflanka la maljunuloj mem kulpas pri tiu, ĉar ili ofte libervole rezignas pri aktiva socia partopreno kaj lasas sin puŝi al la rando: malgraŭ iliaj sperto, sageco kaj stabila psiko, kiuj povus gvidi la socion en ĝustan direkton. Sed nur tiam, kiam adulto dumvive lernis siajn lekciojn: Sindona amo ne bezonas iun ajn kompenson. Sindona kaj nenion reciproke postulanta amo, estis la principo kiu ĉiam stabiligis la socion, fakto, kiun junuloj ankoraŭ devas lerni: la unuaj spertoj de adoleskantoj estas ke ĉiu ago aŭ servo postulas ekvivalentan kompensan servon, agon aŭ monon. Tiu afero estas pritraktita en la libro de Mark Manson „Ĉio estas fikita - Libro pri espero. La subtila arto de ne zorgi pri fikado." (Originala titolo: „Everthing is fucked – A book about hope. The subtle art of not giving a fuck". En facile komprenebla formo M. Manson en tiu libro priskribas kaj elstaras la esencan valoron, kiun la maljunaj generacioj povas oferti al niaj socioj: La homo ĉiam esperas, esperas loto gajnon, famon, gloron, grandan domon. Sed kun kreskanta aĝo vi pli kaj pli rimarkas ke tiu espero misgvidas vin. Viaj esperoj neniam povas esti plenumita, kaj vi ĉiam denove falas denove en truojn. Tiu estas la grava kaj esenca atuto de la maljunuloj, kiun ili devas demonstri per kvieteca sinteno kaj senekscitanta vivmaniero. Adultoj, kiuj ne lernas sindetenon kaj moderecon restas kvazaŭ en preadulta adoleskanta stato, kaj la varbado kaj amaskomunikiloj faras, ke tiu *esperanta stato* plilongiĝas, ĉiam denove vekante dezirojn. La serĉado de feliĉo (angle: „La pursuit of happiness", kiu eĉ estis fiksita en la usona konstitucio, faras ke ni idiotiĝas, stulte ĉasante efemerajn trofeojn - kiel ĉaroĉevalo, kion oni motivigas ekmovi prezentante furaĝo antau ĝia nazo. F. Schirrmacher skribas „La kontraŭatako devas esti direktita kontraŭ junulara obsedo kaj aĝismo. La plej akra municio venos de esplorado, ekzemple, per la scienca rehabilitado de nia vivsperto. Ĝi fariĝos unu el niaj plej valoraj rimedoj en la estonteco. Same kiel efektiva damaĝo al la cerbo povas esti kaŭzita nur per vortoj, resaniĝo povas okazi per la apliko de ĝusta scio pri si mem." Kaj M. Manson skribas, mi citas: „Eviti senesperecon — tio estas, krei esperon — tio fariĝas la ĉefa klopodo de niaj mensoj. Ĉia signifo, ĉio, kion ni komprenas pri ni mem kaj la mondo, estas konstrukcio, kiun ni konstruas por konservi esperon. Sekve, espero estas la sola afero, por kiu ĉiu el ni volonte mortus. Espero estas tio, kion ni konsideras pli granda ol ni mem. Sen espero, ni rezignas ... Ĉu ni konscias pri tio aŭ ne, ni ĉiuj havas tiajn rakontojn, je kiuj ni kredas, pro kiaj ajn kialoj. Ne gravas, ĉu nia vojo al espero estas pavimita per religia konvinko aŭ evidentec-bazita teorio, per intuicio aŭ bone pripensitaj argumentoj - finfine, ĝi ĉiam kondukas al la sama celo: Vi havas ian kredon, ke (a) ekzistas potencialo por kresko aŭ plibonigo aŭ savo en la estonteco, kaj (b) ekzistas manieroj, kiel ni povas agi nin mem por atingi ĝin. Jen tio. Tagon post tago, jaron post jaro, niaj vivoj konsistas el ĉi tiuj senfinaj interkovriĝoj de ĉi tiuj rakontoj. Ili estas la psikologia karoto ĉe la fino de la bastono."

Do, la granda kaj grava tasko de la maljunuloj estas atentigi la pli junan generacion, ke ni pli bone vivas sen tiuj senesperaj esperoj, sen permanente ĉasi

trofeojn, sed serĉi esperon en pli daŭripovaj celoj kaj sekvi la ekzemplojn de pli memstaraj malnovaj rolmodeloj - vivante en harmonio kun si mem kaj sekve kun la medio.

Ligiloj:
https://www.deutschlandfunk.de/frank-schirrmacher-das-methusalem-komplott-die-macht-des-100.html
https://www.m-vg.de/mediafiles/Leseprobe/9783742311016.pdf – Eltiraĵo el la libro pri Espero de Mark Manson, Parto 1, ĉapitro 1 (ĝis paĝo 21)
https://markmanson.net/how-to-grow-up - Kiel kreski: Gvidilo al esti homo
https://markmanson.net/about - Pri Mark Manson
https://share.google/sbymRhDqwW7s02jaU - Unglückliche Jugend: „Der Druck, sich anzupassen und zu bestehen, ist brutal“

# Diversaĵoj

**Ŝerco** (sendita de Gundhild):

Homo eniras zoologian vendejon kaj volas aĉeti papagon, kiu scipovas paroli.

Vendisto: - Bedaŭrinde mi ne havas papagon, sed mi havas belan pegon.

Aĉetanto: - Ĉu li scipovas paroli?

Vendisto: - Ne, sed li scipovas morsi.

**Proverbo de la monato** (elektita de G. Hennemann)

Hodiaŭ mi prezentas du proverbojn kiuj temas pri komerco kaj la rilatata reklamo, kiu povas esti malkaŝita aŭ kaŝita, sed kiu influas nin ĉiujn donante efemeran esperojn – temo, kiu ankaŭ estas pritraktita en mia eseo „La metusalem komploto“.

[zam-1071.02] Malsaĝulo en foiro estas bona akiro
[zam-1071.03] Malsaĝulo venas, komercisto festenas

https://www.robkeetlaer.nl/esperanto/proverbaro/proverbo_001471.htm

# Raporto - Pri nia ĉi-jara kluba somera festo. De Felmano Ulriko.

Ĉi jare neniu de niaj membroj povis disponigi sian ĝardenon por nia somera festo. Pro tio ni diskutis ideojn, kie kaj kiel organizi ĝin. Frank Lappe proponis la Frankfurtan Botanikan Ĝardenon, jaj asertis, ke oni povas ĝin lupreni, kaj tiu propono venkis. Bedaŭrinde, poste evidentiĝis ke tio tamen ne funkciis. Ĉar ni malfrue informiĝis pri tio, simila alternativo ŝajne mankis, kaj estiĝis la alternativa plano simple kunveni en la publike alirebla Verdkastelparko (Grüneburgpark). Tamen, dek tagojn antaŭ la dato, Georgo havis plian ideon: veturi al la internacia kulturfesto en Darmstadt, kaj tie renkonti la Darmŝtatajn Esperantistojn. Dirite, informite...

Sekve, sabaton, la 30-an de aŭgusto, en la apuda urbo Darmstadt okazis la tuttaga internacia kultura festivalo sur la Friedensplatz ("placo de la paco") kun partopreno de kvar Esperantistoj de la Esperantosocieto Frankfurtmajno kaj tri el Darmŝtato, entute ses, ĉar Sebastian ja membras en ambaŭ. La festoplaco prezentis ĉirkaŭ cent budojn, operaciitaj de diversaj etnoj, ofertantaj informojn kaj tipajn lokajn aĵojn, inkluzive de dancoj, kantoj, ŝtofoj, vestaĵoj, trinkaĵoj kaj manĝaĵoj. Ĉe kelkaj standoj oni povis ankaŭ praktiki artojn aŭ metiojn, produkti, ĉizi, kma. La Eritreanoj estis plej bone reprezentitaj, kun kvar budoj: virina grupo, universitata grupo, infanĝardena grupo kaj alia, kies temon mi ne vidis. La Darmŝtat'a Esperantogrupo ankaŭ havis budon, kaj ni vizitis ilin ankaŭ por iom subteni ilian reklamadon. Mi mem distribuis kvindek flugfoliojn al nespoj kaj havis plurajn longajn konversaciojn kun personoj, el kiuj multaj neniam antaŭe aŭdis pri Esperanto. Unu interesito tuj demandis pri la datoj de la renkontiĝoj en Darmstadt kaj Frankfurto, ĉar li loĝas en Darmŝtato kaj laboras en Frankfurto. Mi havis ankaŭ konversacion kun kvar afrikanoj, kiuj estis ekstreme fascinitaj, kaj ankaŭ ili neniam antaŭe sciiĝis pri Esperanto. Estis bela tago kun bona vetero, bonaj manĝaĵoj (mi havis la mian de la eritreaj virinoj) kaj bonaj konversacioj.

Ĝojofakte, je la 16-a horo alvenis la urbestro de Darmstadt, faris longan paroladon, kaj poste oficiale solene "malfermis" la festivalon (la festo fakte komenciĝis je la 9-a horo matene, kaj daŭris ĝis la 20-a horo).



Tio estas ĉirkaŭ kvarono de la tuto. Dekstre de tiu bildo troviĝis ankoraŭ multe pli da standoj.



Tio estis la alia finiĝo de la uzita areo.

Komence iomete pluvis, sed poste ni havis sunon kaj varmon.

"La" stando:







Darmŝtatanino kun du "delegitoj" el Frankfurto.




La "animo kaj koro" de la Darmŝtata grupo: Detlef Haußner kaj Susanne Warmuth.



Mia manĝaĵo, servita de Eritrea kuiristino. Mi tre ŝatis ĝin, kaj aldone trinkis Darmŝtatan bieron.




Denove la budo, nun jam je la vespero.
Mi tre ĝuis la tagon! Bedaŭrindas tamen, ke ĉi-foje tiom malmultaj ESF-anoj povis ĉeesti.

# Lasta Paĝo.
## Pri la unuaj Esperantokongresoj, de Felmano Ulriko

Preskaŭ ĉiuj Esperantistoj scias ja pri la unua Internacia Esperanto-Kongreso okazinta 1905 en Bulonjo-sur-maro (nuntempe tiuj internaciaj kongresoj nomiĝas Universalaj Kongresoj).

Malpli da Esperantistoj tamen scias pri la Internacia Esperanto-festo, ofte nomata Antaŭ-Kongreso, okazinta unu jaron antaŭe 1904 en Kalejzo (Calais). Samjare ankaŭ jam fondiĝis nia Esperanto-Societo Frankfurto ĉe Majno.

Sed preskaŭ neniu scias pri la vere unua internacia Esperanto-Kunveno okazinta 1903 en Lehavro, Francujo. Tie tiam, du jarojn antaŭ la fama kongreso en Bulonjo, renkontiĝis ĉefe britaj kaj francaj Esperantistoj, kaj unu ĉeĥa studento, por elprovi, ĉu parola interŝanĝiĝo inter homoj de malsama gepatra lingvo bone funkcias. Ĝis tiam Esperantistoj ja preskaŭ nur interŝanĝis leterojn, gazetartikolojn, kaj aliajn tekstojn. Renkontiĝoj de espoj okazis plej ofte inter samlandanoj, kaj ĉiam nur en malgrandaj grupoj, plej ofte nur du aŭ tri personoj (kiel la vizito de Grabowski ĉe Zamenhof, kaj la vizitoj de Zamĉjo en la fruaj, ankoraŭ malgrandaj, Esperantokluboj). La plej multaj interparolantoj de Esperanto en tiu tempo ja troviĝis en Rusujo. Sed en Lehavro, Esperantistoj el tri nacioj de tri landoj kunvenis, kaj komunikis per la Internacia Lingvo de Doktoro Esperanto! Kaj ili ankaŭ promociis la ideon de pli granda kongreso, kio vere okazis unu jaron poste en Kalejzo.




(Bildo prenita el la komikso "Ludoviko Lazaro Zamenhofo - Biografio de la kreinto de Esperanto", de Yanpetro Kavlan.)